

Alvoko okaze de la Internacia Virina Tago 2013

Ni Hirosima Esperanto-Centro kiel unu el 23 organizoj sub la Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2013 Hirosima lanxas mesagxon. Ni petas vin doni al ni vian respondan mesagxon por la Tago, kaj transdoni la mesagxon al viaj geamikoj.

Ni ekspozicios vian mesagxon cxe publikaj ejoj de la urbo Hirosima.

Limdato estas la 10-a de februaro 2013, cxar ni havos ekspoziciojn de la mesagxo ekde la 18-a de februaro.

Kun antauxdanko, OSIOKA Taeko

Mesagxo por la Internacia Virina Tago 2013, Hirosima

Estimataj, kaj karaj gesinjoroj en la mondo,

Ni, la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago de UN 2013 Hirosima, konsistas el 23 organizoj kaj la municipo Hirosima, salutas vin solidarece, kaj elkore alvokas al vi. En la 3-a de marto, 2013, por la Internacia Virina Tago de UN en la 8-a de marto, ni havos kunvenon por kunlaboro per sagxo kaj fortoj, kaj antauxenpusxi konstruon de la socio por komuna partopreno de geviroj.

Virinoj de la gubernio kaj de la urbo Hirosima organizas kunlaborojn por heredigo de la socio paca al sekvanta generacio. Nur en paco ni povas koncentri fortojn por antauxenpusxo de komuna partopreno de geviroj.

Post publikigo de la "Listo pri Egaleco inter Viro kaj Virino" de la Monda Ekonomia Forumo en oktobro, 2012, ni denove pripensis pri nuna situacio de la japanaj virinoj. Laux vidpunkto pri sxanco de dungigxo, salajro, edukiteco, sano, vivkondicxo, partopreno en politiko, entute la japanaj virinoj lokigxas 101-a en la listo!

Longe dauxras malprospera ekonomio aldone al la katastrofo kaj de naturo kaj de la atomcentralo, kiu aparte atakas gejunulojn kaj virinojn. "Ni pripensu pri felicxo de la virinoj" estas la cxefa temo de la Tago, 2013, kaj ni lernas pri hodiauxa situacio de virinaj vivo, malricxeco, kaj ties influo al kresko de infanoj, en Hirosima, kaj en Japanio. Ni kosiligxos niajn taskojn, kaj antauxenpusxos komunan partoprenon de geviroj en la socio.

Bonvolu informi nin pri situacio de virinaj vivo kaj laboro cxirkaux vi, ni petas. Vian mesagxon ni ekspozicios en tri kunvenejoj de la urbo.

S-ino YOSIDA Mariko

Prezidanto de la plenuma komitato por la Internacia Virina Tago 2013, Hirosima

La municipo Hirosima

Kun virinaj organizoj:

Arko de Hirosima/ Konsilio Yui-porto / Kina karavano/ Novjapana virina asocio/ Ligo de vartistoj/ Hirosima Esperanto-Centro/ Ligo de medicinaj sindikatoj/ Sindikato de emeritoj/ Instruista laborsindikato/

Ligo de solaj patrino k infano(urba)/ Laborsindikato de municipaj oficistoj/ Laborsindikato de urbaj oficistoj/

Ligo de patrinoj de la urbo / Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hirosima/ Ligo de virinaj asocioj WENET/ Ligo de Komercistoj/ Virina demokrata klubo/ YWCA/ Centro de komuna partopreno de geviroj en la socio/

Ligo de Patrinoj de la gubernio/ Koruso Pacxe/ Sekcio de komuna partopreno de geviroj de municipo Hirosima/

Konsilio de Kino-rondoj de la urbo.

Limdato kaj aliaj: gxis la 10-a, februaro 2013.

Maksimume sur unu leterpapiro A-4 formata. Ankaux viroj rajtas skribi al ni.

Kun notoj petataj: Nomo, sekso, agxo se eble, profesio, logxluko(urbonomo), lando.

Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp

Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio